

# Sándor Giesswein

(1856-1923)

*Prelego en la interlingvistika seminario en Győr  
la 3an de decembro 1988*

Mi volas omaĝi per mia prelego al la neinde forgesita eminentulo de nia movado Sándor Giesswein pro kvar kialoj:

1. Li mortis la 15an de novembro 1923 en Budapeŝto, do ĉi-jare ni jubileos la 65an datrevenon de lia morto.

2. Dum longaj jaroj de lia publika agado ne nur loke, sed ankaŭ alirilate li strikte ligiĝis al urbo Győr kaj al la departementoj Győr kaj Moson.

3. Li estis ne nur movadano, sed ankaŭ eminenta lingvisto de sia tempo. Pri ĉi tiu parto de lia publikutila agado ni, esperantistoj scias nemulte.

4. Menciindas ankaŭ aliaj kampoj de lia publika agado, ekz. lia apostolado por la paco, liaj klopodoj solvi humane-krlstane la sociajn problemojn, lia iniciatemo, senantaŭjuĝa esploro kaj malfermiteco al novaj homutilaj ideoj ekz. al feminismo, do faktoj, kiujn ankaŭ ni, esperantistoj nepre devas koni.

Li naskigis en 1856, 3 jarojn pli frue ol Zamenhof kaj vivis en epoko, kiam la rapide evoluanta kapitalismo starigis la katolikan eklezion – funkciantan ankoraŭ, pro komprenebla inercio, en la malnovaj kadroj, elformitaj dum la feŭdismo – antaŭ la devigon ŝanĝi sin, adapti sin al la novaj postuloj kaj cirkonstancoj, kio komencis efektiviĝi nur per la reformoj de papo Leono 13a.

Giesswein naskiĝis en la transdanubia urbeto Tata en Hungario kiel filo de bona administranto de grafo Esterházy. La patrino, Elisabeth Eckhardt estis nasklia en Vieno, do Sándor Giesswein parolis denaske la germanan same perfekte kiel la hungaran. La malsupraĵn klasojn de la gimnazio li finis en Tata ĉe la piaristoj kaj la supraĵn en la benediktana gimnazio de Győr jam kiel minore ordinato. Li finis teologiajn studojn en la Viena Pazmaneumo kaj en la Budapeŝta Universitato.

Ordinite al pastro, li komencis sian eklezian servon kiel vikario en Kismarton (nun Eisenstadt, Aŭstrio). Li lernis facile, estis malfermita al ĉiuj facetoj de la vivo kaj scienco. Jam dum sia studenteco li bone posedis krom la latina kaj greka la francan, anglan kaj italan, intense okupiĝis pri lingvistiko kaj ekstudis lingvojn de la antikva mondo. En 1881 li instruas matematikon en la Porinstruista Altlernejo en Győr, en 1885 li komencas sian servon en la episkopa kortego samurbe kaj trairas multajn ŝtupojn de la kapitulata hierarĥio tra kanoniko ĝis laŭtitola abato kaj fine papa prelato.

Sian fakliteraturan verkadon li startigas per la libro *La atesto de Mizraim kaj Assur* en 1887, do en la jaro, kiam Zamenhof aperigis la *Unuan Libron*. En ĉi tiu traktaĵo li pravas la aŭtentikecon de la sanktaj skriboj de la *Malnova Testamento* en la prilumo de la egiptologio kaj asirologio. Tiutempe li prelegis en la Societo Sankta Stefano pri la temo *Parolo kaj pensado kun aparta konsidero al la lingvofilozofio de Maximilian Müller*. En la Hungara Akademio de Sciencoj li prelegis pri la *Praegipta libro de Mortintoj*.

Lingvistike plej elstara verko lia estas la libro *La ĉefaj problemoj de la kompara lingvistiko*, kiu aperos poste ankaŭ en la germana, farante konsiderindan eĥon en la eksterlanda lingvoscienco. Pri la studado de uralistiko atestas lia traktaĵo *Lokaj demonstrativaj elementoj de la uralaj lingvoj*, klun li aperigas ankaŭ france. En 1889 li prelegas en la pariza kongreso de Société bibliographique kun la titolo: *Progrés de la linguistique*.

Liaj meritoj en la scienca laboro kaj publika vivo, lia verva kaj reagema spirito altiras atenton al li. Oni elektas lin vicprezidanto de la Societo Sankta Stefano, katolika organizo por la progresigo de sciencoj, literaturo kaj libroeldonado. En 1915 li kunfondas kaj prezidas ĝismorte la Akademion Sankta Stefano, kiu celas la kultivadon de katolikaj-religiaj sciencoj kaj literaturo.

Pri lia multflanka interesiĝo kaj malfermiteco al la pli vasta medio atestas, ke li ekokupiĝas pri la sociaj problemoj de la laboristaro. Li kuniniciatas la kristan-socialan movadon, fondas ĝian unuan grupon en Győr. Oni elektas lin deputito en la parlamenton en la distrikto Moson en la jaro 1904, kaj li restas parlamentano seninterrompe ĝis sia morto.

Konsekvence li pledas por la interkompreniĝo de la sociaj klasoj, popoloj, por la egalrajtigo de la virinoj kaj la malaltaj tavoloj de la socio. Li batalas por la reformado de la katolika eklezio, por la adaptiĝo al la postuloj de la rapide ŝanĝiĝanta epoko, trasulkita de markantaj ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj. Li estas nepridubbla reprezentanto de la progreso sur ĉiuj kampoj, per sia vasta intelekto li vidas la mondon tutece, pro tio kun fera konsekvenco li reprezentas la progreson sur ĉiuj kampoj de la socia vivo.

Tiel en 1911 li venas logike al Esperanto, en kiu li vidas gravan rimedon de la paco kaj interpopola kompreno. Fervore li studas la problemojn kaj historion de kreo de mondlingvoj. Li ellernas volapukon, sed ekkoninte la avantaĝojn de Esperanto, senrezerve li adeптиĝas kaj restas fidela al ĝi ĝismorte. Li fariĝas prezidanto de la tiujare fondita Hungara Esperanto-Societo, oficiale reprezentas la Ministerion pri Klerigo en la Antverpena kaj Krakova kongresoj. Li prezidas la unuan hungaran landan Esperanto-kongreson, Esperante celebras mesojn, predikas kaj prelegas en ĉi tiu lingvo en multaj urboj kaj landoj de Eŭropo.

Plurfoje li pledas por Esperanto en la parlamento. Li elektiĝas en la estraron de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), Internacio Katolika (IKA), Mondjunularo Katolika (MOKA), fariĝas prezidanto de Internacia Pacifista Ligo Esperantista. Elektiĝas ano de Lingva Komitato. Ĉiam li surhavas insignon kun verda stelo, kaj la lastan horon de sia vivo li instruas Esperanton al la edzino de sia nevo. En liaj lastaj jaroj li kunlaboris en la prestiĝa revuo *Literatura Mondo*. Lian grandecon montras ankaŭ la fakto, ke lia nomo menciigis kiel ebla ĉefministro post la unua mondmilito.

Parolante pri lia lingvistika uvrado, oni devas mencii, ke dum siaj studentaj jaroj kaj ankaŭ en la postaj jaroj kun malmulta publika agado li intense enprofundiĝis en la studadon de la naturo de lingvoj, kion akcelis lia scio de pluraj lingvoj.

Lia plej ampleksa kaj signifa verko estas la libro *Ĉefaj problemoj da la kompara lingvistiko*, aperinta en 1890 en Győr kaj post du jaroj ankaŭ germane en Freiburg. En ĝi li ekzamenas du demandojn:

**I.** La lingvistiko kaj la unuorigina deveno de la homaro. Do, ĉu la lingvoj estas rekondukeblaj al unu pralingvo? Ĉu la grandaj diferencoj inter la ekzistantaj lingvoj allasas la hipotezon, ke per natura evoluo, laŭ siaj propraj leĝoj internaj ili diverĝis de unusola pralingvo? Serĉante la respondon unue li ekzamenas la morfologiajn tipojn de la lingvoj, kaj laŭ la tiama nivelo de la lingvoscienco li konstatas tri bazajn tipojn: la izolan (ekz. la ĉina), la aglutinan (ekz. finnougraj) kaj la fleksian (ekz. ĝermanaj) lingvojn. Inter ĉi tiuj tipoj estas diakronaj kaj sinkronaj transiroj, variantoj. La finaĵoj kaj afiksoj de la aglutinaj lingvoj elformiĝis laŭ li el memstaraj vortoj, kaj kun la tempo ili modifiĝis nerekonuoblaj. La fleksio estiĝis tiel, ke la vokalo de la radiko adaptiĝis, asimiliĝis al tiu de la finaĵo. Kiel ekzemplon li mencias la latinan *ama-v-er-a-m* <ama-fu (=kreski) -as (=kopulo el 'spiri') -a (paseo) -m (mei, mi-hi, me) aŭ la germanan *apful-i* > *apfeli* > *Äpfel*.

En la aglutinaj lingvoj ekzistas ankaŭ fleksiaj formoj, ekz. la hungara *fut-j* > *fuss*, *fele* > *fél*, *szele* > *szél*, *tele* > *tél*. La lapona lingvo troviĝas en la stadio de transiro al fleksia lingvo. Inter la ural-altajaj lingvoj la mandĵua havas duone izolajn formojn, la turka havas jam evoluintan aglutinan sistemon. Ĉe la uralaj lingvoj la du ekstremojn reprezentas la aglutina finna kaj la transira fleksia samoĵeda.

La direkto de la evoluo estas izola > aglutina > fleksia > kaj izola. Tia novizoleca estas la angla, kie ekz. ĉe la vorto *hand* oni devas meti la personan pronomon, por unusenciĝi ĝin kiel verbon, diferencigante de la substantiva *hand*. La muzgua lingvo en Centra Afriko uzas kaj infleksion kaj afiksojn.

Do la diferencoj, ekzistantaj inter la lingvoj pro strukturaj ŝanĝiĝoj, ne ekskludas la komunan originon de la lingvoj, kvankam ankaŭ ne povas pruvi ĝin surbaze de la disponeblaj donitaĵoj.

Li rimarkas – argumentante kontraŭ la teorio pri la supereco de iuj kulturoj sekve de uzo ĉe certa (ni eldiru) fleksia lingvotipo –, ke la lingvotipoj ne ligiĝas fikse al rasoj aŭ speco de kulturo.

Ekzamenante la genealogiajn interrilatojn de lingvoj kaj lingvofamilioj, li analizas la kaŭzojn kaj specojn de fonetikaj kaj fonologiaj ŝanĝiĝoj kaj kritikas la koncepton de la germanaj pozitivistoj, laŭ kiu la evoluo de lingvoj estas regata de naturlaĝoj – kaj tiamaniere nerekte li argumentas por la eblo krei lingvojn, do arta farado de lingvoj, tiel ankaŭ por la ekzistorajto de Esperanto.

Fine li konkludas, ke ne pruveblas la iama ekzisto de ununura pralingvo, sed tre verŝajnas, se se rigardi la evoluon de la nun vivantaj lingvoj kaj la komunan originon dokumenteblan de ŝajne tre diferencaj lingvoj.

**II.** En la dua parto kritike li sublupeigas la teorion pri la origino de la homa lingvo.

1) Laŭ la teorio de tradiciismo la homo ellernis la lingvon de Dio, ĉar lingvo ne kreeblas sen pensado kaj pensado ne eblas sen lingvo. Giesswein opinias, ke la parolo ne estas nepra kondiĉo de la pensado (la homo ja havas en sia konscio t.n. *mental pictures*, mensajn, imagajn bildojn), la homo povas pensi ankaŭ sen parolo. La lingvo estas en certa grado produkto de la pensado. Sen pensado ne eblas parolo senchava. Sed surdmutuloj pensas ankaŭ sen lingvo – diras Giesswein La homa korpo rilatas tiel al la animo, kiel la parolo al la pensado. Giesswein ne ĝisfunde komprenis la dialektan interefikon de lingvo kaj pensado, tro substrekante la aŭtonomecon de la pensado, tamen li venis tre proksime al tio laŭ la atesto de la supra komparo.

2) Laŭ la evoluismeca teorio la lingvo estas denaska kapablo de la homo. Ĝia estiĝo estas instinkta, sen kunefiko de la homa volo. Ĝi erupciiĝas el la homo nereteneble.

3) Laŭ la evoluisma teorio la lingvo estas homa kreaĵo, kiun la homo evoluigis dum longa tempo el elementaj paroleroj, ekz. interjekcioj kaj onomatopoej.

4) Giesswein aliĝas al la teorio de la eklezia patro Sankta Gregoro de Nyssa, laŭ kiu la lingvo estas *in potentia* donaco de Dio – do laŭ nuna esprimo denaska ebleco, virtuala kapablo de la homo –, sed *in actu*, en sia efektiviĝo produkto de la libera agado de la homo.

Li konkludas, ke ne eblas difini la pralingvon, sed supozeble ĝi devis esti izola. La homo uzis unue *termini speciales*, do konkretigajn vortojn, kiuj poste fariĝis *termini generales*, do vortoj kun karaktero de ĝeneraleco, naciaj vortoj.

En 1894 li skribis traktaton pri la lokaj demonstrativaj elementoj *t*, *n*, *l* en la ural-altajaj, hindo-eŭropaj kaj semido-ĥamidaj lingvoj. Li komparas ĉi tiujn elementojn, apartenantajn al la plej daŭremaj partoj de la lingvoj, kaj rimarkas, ke ili multe koincidas laŭ funkcio kaj radikoj. Laŭ lia opinio tio igas konkludi pri la komuna deveno de ĉi tri grupoj de lingvoj.

Pro liaj ceteraj publikutilaj agadoj li ne plu havas tempon por pli profundaj lingvistikaj esploroj, tamen li sekvas la evoluon de la lingvoscienco. La frukto de tio estas lia resumata prelego *Les progrès de la linguistique*, kiun li prezentas en bibliografia kongreso en Parizo.

Poste li okupiĝas nur pri la problemaro de mondlingvoj. El entuziasma volapukisto li "apostatiĝas" konvinkita esperantisto. Siajn pensojn pri la evoluo de la ideo de interlingvismo li resumas en artikolo *La demando de la mondlingvo*, aperinta en la *Publikaĵoj de la Hungara Filozofia Asocio*.

Enkonduke al la artikolo li konstatas, ke dum la dokumentita historio de la homaro oni ĉiam strebis uzi kaj ankaŭ uzis kun varia efikradiuso lingvojn, perantajn inter pluraj nacioj. Tiaj estis la

asiria-babilona, aramea, greka en la antikveco kaj la latina, kiu plu servis ankaŭ en la mezepoko ĝis la novepoko.

La perdon de la influo de la latina li atribuas al tio, ke unuflanke oni kultivis la literaturon kaj sciencojn ĉiam pli en naciaj lingvoj, atingeblaj pli facile al ĉiam pli vastaj rondoj, aliflanke la konata mondo plivastiĝis per novaj popoloj kaj kulturoj sekve de la malkovro de Ameriko.

Grava mejloŝtono sur la vojo de la elformiĝo de artefarita mondlingvo estas laŭ Giesswein la respondletero de Descartes al patro Mersenne, en kiu la granda franca filozofo eksplikas jene la postulojn pri artefarita mondlingvo.

a) la gramatika strukturo estu skemeca, sen esceptoj kaj aglutina

b) rilate al la leksemaro: estu plena kongruenco de vorto kaj nocio (tio estas *langue philosophique*) kaj la leksemoj estu prenitaj el naturaj lingvoj.

La granda germana filozofo Leibnitz volis lingvon bazitan sur matematiko. La vortoj havu valoron de numeroj, oni povu fari matematikajn operaciojn per ili, venante tiamaniere al novaj konoj. Sed pro la komplikeco de la tasko Leibnitz proponis kiel praktikan, provizoran solvon la simpligon de la latina (forlaso de personaj finaĵoj ĉe verboj kaj kazofinaĵoj ĉe epitetoj, regoj post prepozicioj ktp.).

Giesswein parolas pri la kategoriantaj sistemoj de Dalgarno kaj Wilkins, kaj konstatas, ke la analizado de la vortoj laŭ kategorioj troŝarĝas la homan menson kaj malhelpas la praktikan uzadon de tiaj lingvoj.

Charles Renouvier elstarigas du postulojn de artefarita mondlingvo, kiuj plene realiĝis poste en Esperanto: tia mondlingvo estu strukture filozofia kaj leksikone empiria.

Pri Volapuko Giesswein opinias, ke kvankam ĝia gramatiko estas skemeca, sed nenecese komplika, kaj ĝia vortaro ja empiria, sed la vortoj estas torditaj ĝis nere konebleco, sekve malfacile memoreblaj. Esperanto estas optimuma laŭ ĉiuj vidpunktoj. Li defendas ĝin kontraŭ Brugmann kaj Leskien, laŭ kiuj Esperanto disdialektiĝos. Li kontraŭjetas, ke Esperanto estas parolata ne kiel unua, gepatra lingvo sed kiel dua, do fremda lingvo, sekve ĝi povas konservi sian unuecon.

Giesswein ricevis distingitan lokon en la tombejo Kerepesi de la Budapeŝta urbestro. Ironio de la sorto estas, ke la pioniro de la socia penso, paco kaj internaciismo estis forigita de tiu honora eterna ripozejo ĝuste de tiu reĝimo, kiu skribis ruĝe sur sia flago ĉi tiujn vortojn. Nun li kuŝas en la subpreĝejo de la katedralo de Győr – espereble – en eterna ripozo.

*Jozefo Horvath*